

Enketo de la ŝtato Neuchâtel pri la bezonoj de la junularo, 7-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 539, 1974.02.06 & 02.09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni hodiaŭ konkludas nian preleg-serion pri grava enketo, kiu tuŝis en 1971 sep procentojn de la junularo 16-20-jaraĝa de la kantono Neuchâtel, prezentante al vi tion, kion la junularo opinias pri la geedza vivo, pri la infanoj kaj pri la seksaj rilatoj. La pasintan semajnon ni jam komencis pritrakti tiun vastegan temon. Tre resume ni povas diri, ke preskaŭ ĉiuj gejunuloj antaŭvidas, ke ili geedziĝos. Ili tion faros inter 20 kaj 30 jaroj. La plej granda maloportunaĵo de la geedziĝo estas la perdo de la propra libereco. Pro tio la divorco devus povi tuj okazi, kiam unu el la geedzoj ĝin petas. Ĝi devas esti konsiderata kiel rimedo por ripari elekt-erarojn. La gejunuloj antaŭvidas la geedziĝon kun la ebleco povi ĝin facile rompi, se ĝi montriĝos nekontentiga.

A.- En tiu enketo la infanoj neniam estis registritaj kiel negativa fakto. La geedziĝo estas antaŭvidata kun nasko de infanoj.

Cl.- Ĝuste rilate al la infanoj estis faritaj kelkaj fundamentaj demandoj. Ĉu vi antaŭvidas havi infanojn ? Certe jes, respondis 60 procentoj ; verŝajne : 15 procentoj ; tio dependos de la eblecoj : 15 procentoj ; preskaŭ certe : 5 procentoj. Neniu antaŭvidis seninfanan geedziĝon.

A.- Pri la nombro de la antaŭviditaj gefiloj oni ricevas la ĉisekvan statistikon : 1 infano : 5 procentoj ; 2 infanoj : 60 procentoj ; 3 infanoj : 25 procentoj ; 4 aŭ 5 infanoj : 5 procentoj ; 6 aŭ pli : nul procento. 85 procentoj de la gejunuloj sin prononcis por geedza vivo kun 2 ĝis maksimume 3 infanoj. Tiuj nombroj pli malpli respondas al la socia situacio ekzistanta en la kantono Neuchâtel : po 2,46 infanoj por paro.

Cl.- En kiu periodo de la geedza vivo vi deziras naski ? Mi ne scias, respondis 10 procentoj. Tuj post la geedziĝo : 10 procentoj. Ĉirkaŭ 2 jaroj post la geedziĝo : 40 procentoj. Tio dependos de la cirkonstancoj : 25 procentoj. Post pluraj geedzaj jaroj : 10 procentoj. Konklude : la plimulto ŝatus travivi la 2 unuajn jarojn de la geedziĝo sen infanoj.

A.- La enketo faris demandojn pri la sekseco. 90 procentoj de la demanditoj respondis al tiuj demandoj, kies respondoj povas esti tiel resumitaj. Oni unue informiĝis, por scii, ĉu la gejunuloj dependigas la seksajn rilatojn de estonta edziĝo. Nur 5 procentoj de la junuloj kaj 15 procentoj de la junulinoj opinias, ke la seksaj rilatoj devas plenumiĝi post la geedziĝo. La triono de la gejunuloj opinias, ke oni povas havi seksajn rilatojn, kiam oni sentas reciprokan amon, tio senkonsidere kun estonta geedziĝo. Alia triono opinias preskaŭ same, sed opinias, ke tiam oni devas antaŭvidi geedziĝon. Preskaŭ la duono de la junuloj opinias, ke oni povas havi seksajn rilatojn, kiam oni sentas altiron al knabino aŭ simplan emon al tiuj rilatoj. Ĉe la junulinoj tamen nur 10 procentoj partoprenas tiun vidpunkton. Kvinfoje malpli. Tio pravas plian fojon, ke la seksaj rilatoj ŝajnas impliki malpli da respondeco ĉe la junuloj, ol ĉe la junulinoj, kiuj antaŭvidas la konsekvencojn de tiu ago. La junulinoj tendencas ligi la seksan vivon kun la institucio de la geedziĝo. La pasintan semajnon ni vidis, ke la geedziĝo estas antaŭvidita por la junulinoj je la 22-a jaraĝo, por la junuloj je la 26-a jaraĝo. Tio signifas, ke la junuloj sentas la edziĝon kiel vivetapon sufiĉe foran. Kontraŭe la junulinoj sin jam pretigas ĝin travivi. Estas normale, ke tio nasku du malsimilajn kondukt-manierojn.

Cl.- La plej persona demando de tiu parto de la enketo estis : « Ĉu vi jam havis seksajn rilatojn ? » 15 procentoj de la demanditoj ne respondis al tiu demando. Laŭ la ricevitaj respondoj oni ricevas la ĉi sekvajn statistikojn : 45 procentoj de la junuloj jam travivis seksajn rilatojn. Junulinoj : nur 25 procentoj. Tiuj procentaĵoj tute nature kreskas kun la aĝo. Gejunuloj malpli ol 18-jaraĝaj : jes : 25 procentoj. Pli ol 18-jaraĝaj : jes 50 procentoj. Ŝajnas, ke en la metilernejaj medioj la seksaj kuniĝoj estas pli oftaj, ol en la gestudentaj medioj.

A.- Tiuj respondoj atestas, ke la seksa matureco situas ĉirkaŭ la 18-a jaraĝo.

Cl.- Koncerne scienca informadon en la lernejoj pri la seksaj problemoj 80 procentoj de la gejunuloj opinias, ke tiu instruado devus esti organizita. Pri la koncernataj lernejoj la granda plimulto vidus tiun informadon en la duagrada lernejoj. Tio signifas, ke ĝi devus tuŝi gelernantojn ekde la 11-a jaraĝo.

A.- Jen rigardo al la religio. Ĉu vi antaŭvidas religian benon de via geedziĝo ? Oni ricevas la ĉisekvajn respondojn : Mi ne scias : 20 procento ; jes, pro religia konvinko : 40 procentoj ; jes, pro sociaj konvencioj : 20 procentoj ; ne, mi estas nekredanto : 20 procentoj. Se oni komparas tiujn respondojn kun tiu de la ĉapitro de la enketo, kiu rekte informiĝis pri la religia sento, oni konstatas, ke proksimume la duono de tiuj, kiuj sin proklamis nepraktikantoj, tamen antaŭvidas benigi sian geedziĝan feston. La kontraŭstaro al tiu benado estas pli forta ĉe la junuloj, ol ĉe la junulinoj ; 20 procentoj de diferenco ; kaj ĉe la gestudentoj, ol ĉe la metigelernantoj : 15 procentoj de diferenco.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Estas konkludo al prelegaro, kiu raportis pri enketo, kiu tuŝis 7 procentojn de la junularo de la kantono Neuchâtel. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!